

& Balado pri la morto de dek-du-kapa drako:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 950 paŝoj. Verkis Vladimír Gazda (Frenezetaĵoj, Bratislava 1992). Baladigis Martin Strid (2016) per popolmelodio sveda "Hårgalåten" modifita kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:25>(

/mimi mifa mire; redo doLa Lado; doTi TiMi SiTi; LaSi LaTi dore;

(#Rekantaĵe: mimi mifa mire; redo doLa Lado; doTi TiMi SiTi; LaTi doTi La La;

)×38)+

(&Strofoj:

'1 Ie ege fore, ; tute ĉe mond-rando ;
estis iam iu ; eta reĝolando;

(×: **Dancu kun la drako ; Tenu min je
mano ; Ni ne timu morton ; Dancu
kun la drako.**)

'2 en ĝi ĉio estis ; inda, bona, bela ; kaj
la vivo tie ; estis – nu, fabela.

'3 En la lando estis ; bela ĉefa urbo ;
ankaŭ tie ĉiuj ; vivis sen perturbo.

'4 Sed post certa tempo ; jen, okazis io,
; kio metis finon ; al ĉi idilio:

'5 iun tagon venis ; kun bruego, krako ;
al la ĉefa urbo ; dek-du kapa drako

'6 el la dek du faŭkoj ; fulmojn, fajron
sputis - ; pro teruro granda ; ĉiu hom'
ekmutis.

'7 Al kastelo reĝa ; l' drako sin alrulis, ;
fajron elkraĉante ; tiel ĉi postulis:

'8 "Se vi volas plue ; vivon vian ĝui, ; la
ĉefurbo devos ; al mi kontribui

'9 ĉiutage dek du ; junajn virgulinon ;
kaj kun ili dek du ; diversspecajn
vinojn.

'10 Pro stomak' malbona ; tenas mi
dieton, ; manĝi povas mi nur ; virgan
viandeton,

'11 kaj bongustas pleje ; juna virgulino,
; se ŝin manĝi povas ; mi kun bona
vino.

'12 Morgaŭ la sendaĵo ; venu jam unua ;
kiam la ĉielo ; ĉesis esti blua

'13 kaj la strigoj ĥore ; en arbar' ululas,
; tiam virgulinon ; mi plej multe ĝuas."
.....

'14 Poste sin fortrenis ; la aĉega besto, ;
kaŝis sin en sia ; apudurba nesto.

'15 Ĉiujn en la urbo ; granda tim'
ekregis, ili reĝon sian ; tiel ĉi petegis
.....

'16 ĉiuj surgenue, ; kun korŝira veo ;
"Savu nin, ho, reĝo, ; savu de l' pereol'
.....

'17 Aŭdu niajn veojn, ; aŭdu niajn
petojn, ; savu, reĝo, savu ; niajn
filinetojn!"

'18 Silentigis l' reĝo ; ilin per mansigno
; kaj al la petintoj ; diris li kun digno:
.....

'19 "Se nin iu de la ; drako liberigos, ;
mi filinon mian ; al li edzinigos.

'20 Kaj ĉar li ja faros ; al ni grandan
bonon, ; tuj al li mi cedos ; ankaŭ mian
tronon."

'21 Disfamiĝis fulme ; tiu ĉi proklamo,
; venis tuj bravuloj ; de l' plej bona
famo

'22 indaj kavaliroj ; de diversa aĝo, ;
lertaj batalantoj ; ili kun kuraĝo

'23 unu post alia ; l' drakon venki
provis; sed en tiu provo ; ĉiuj morton
trovis.

'24 Ekfunebri l' urbo ; tuta senespere. ;
Tamen, iun tagon, ; jen, antaŭvespere
.....

'25 sur la ĉefan placon ; antaŭ l'
urbodomo ; venis unu bela, ; juna, forta
homo

'26 kaj ekkriis laŭte: ; "Homoj, mi vin
savos, ; kaj vi ree ĉiuj ; vian pacon
havos!"

'27 "Kiel vi ĝin faros ; sen armil'
junulo? ; Ĉar ja malsukcesis ; multa
jam bravulo!"

'28 "Helpos al mi via ; brava junularo. ;
Ĉiu jun viro ; post dudeka jaro

'29 venu tuj ĉi tien ; plena de elano; mi
lin konatigos ; kun la batalplano.

'30 Lasu ĉiu hejme ; glavon morto-
portan, ; havas ni armilon; pli efikan,
fortan."

'31 Kiam venis ĉiuj, ; tuj la juna homo ;
kunsidigis ilin ; en la urbodomo,

'32 sian planon tuj li ; al la ar' klarigis ;
kaj al disciplino ; ilin li ĵur-ligis.

'33 Ili siavice ; ĝin aprobis kore, ; ĉiuj
ĝin plenumi ; ĵuris plej fervore.

'34 Kiam venis nokto, ; tra la urb'
disiris ; la junuloj. Kaj la ; geurbanoj
miris,

'35 kiam vere baldaŭ ; la drakaĉo
mortis. ; Kio tiam finon : al la monstro
portis?

'36 Tie volis ja la ; senkompata fato, ;
ke la drako simple ; mortu pro malsato,
.....

'37 (ĉar post la ekago ; de la junaj viroj
;)×

'38 en la tuta urbo ; antaŭ nokto-fino ;
restis eĉ ne unu-;sola virgulino!